# *Sesiis en Havano Lacnic 25: teknologioj de la informado en Latinameriko kaj Karibio*




La decido de Kubo konekti?i kun la mondo, kaj ne nur por “trinki el tiu enorma kono-fonto, sed anka? por prezenti per ?i la plej bonan kuban kulturon, la edukadon, sanon kaj humanisman pensaron”, estis ratifita de Mayra Arevich, ekzekutiva prezidantino de la kuba telefonkompanio Etecsa dum la malferma ceremonio de Lacnic25, evento kiu arigas pli ol 500 profesiulojn kaj fakulojn en teknologioj de la informado kaj komunikado de Latinameriko kaj Karibio.

?i aldonis ke la sola formo kiel Kubo povas integri?i suverene al Interreto, estas per vizio de nacio kaj infrastrukturo kiu favoru tiel al la institucioj kiel al la civitanoj. Ni devas elstari pro informatizado sekura, kun ?iuj kaj por ?ies bono, kun vasta gamo de platformoj por provizi servojn kaj enhavojn kun aliro sendrata kaj anka? per la porteblaj telefonoj.

La renkonti?on prezidis anka? Jorge Luis Perdomo, kuba vicministro de komunikado; Wardner Maia, prezidanto de Lacnic kaj aliaj gravaj estraranoj de kompanioj kiuj nuntempa markas gravajn agojn en la informadika scenejo.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/92846-sesiis-en-havano-lacnic-25-teknologioj-de-la-informado-en-latinameriko-kaj-karibio

Radio Habana Cuba